

Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 4an de junio 2009 per Skype.

(Aprobata per retpoŝto poste.)

Partoprenis:

Jardar E. Abrahamsen (JEA, en Trondheim),
Arne Olav Mjøen (AOM, en Trondheim),
Eli Fitjar (EF, en Bergen),
Ulf Lunde (UL, en Os, ĝis inkluzive punkto 4),
Anne Karin Bondhus (AKB, en Bryne),
Asbjørn Lindh (AL, en Oslo),
Ingebjørg Rambjør (IR, en Bergen).

0. Tagordo

Aprobata.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 24an de aprilo 2009

La protokolo aprobiĝis jam tuj post tiu interkonsiliĝo.

2. Ekonomio

La kasisto raportis, ke ni ĵus transigis 10 000 kr pli de Skagen Høyrente al Skagen Vekst aldone al la 15 000 kr metitaj tien en oktobro (nun kreskintaj al 17 320 kr).

En Skagen Høyrente ni havas nun 56 128 kr. Se Skagen Vekst daŭre kreskados (pli ol Skagen Høyrente), la kasisto movos pli da mono en la saman direkton.

3. Landa Kongreso: Kiel fartas la preparoj?

La preparoj de la Loka Kongresa Komitato progresas sen grandaj problemoj. Ni havas ĝis nun 27 aliĝintoj. 25 el ili jam pagis, kaj ĉiuj mendis festmanĝon.

4. Lingvaj paĝoj

La libro *Dek kvin jaroj da Lingvaj paĝoj* estas nun presata 160-ekzemplere en Trondheim.

La rabatita prezo estos 150 kr inkluzive de afranko (al la sep membroj kiuj antaŭmendis). La ordinara prezo estos 175 kr + eventuala afranko.

Ni vendos la libron dum la LK, poste Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim respondecos pri ekspedado de mendotaj libroj. Kasisto Anne Karin Bondhus kunportos al la LK ĝirilojn. Ni uzos la kutiman NEL-konton por la enspezoj.

5. Pondus

De la eldonejo kiu eldonas la norvegan version de *Pondus*, Strand & Øverli, venis demando al Judith Parelle Abrahamsen, la Esperanta tradukanto, ĉu estus ideo eldoni Esperantan albumon. Kaj Norvega Junularo Esperantista kaj Grupo Esperantista de Trondheim ŝajnas preti kontribui finance al la projekto, kondiĉe ke ankaŭ NEL kaj eble Uhlen kontribuos, tiel ke entute estos sufiĉe da mono.

Provizora buĝeto por tia projekto postulus entute proksimume 55 000 kronojn. Tio kovros presadon de 1000 ekzempleroj kaj honorarion al Strand & Øverli. Judith petis (kaj ricevis) konsilojn de la tradukanto de la latina versio.

NEL trovas la projekton interesa, kvankam ĝi estos laborpostula.

6. Broŝuro

La broŝuro «Språket uten grenser» elĉerpiĝis. La estraro prioritatos aŭ represi la broŝuron aŭ fari novan kaj ĝisdatigitan. Tio tamen estos tasko por la venonta estraro.

7. Biblioteko en Hamar

Douglas Draper, Asbjørn Lindh kaj Sverre Opsahl finpakis la periodaĵojn en la biblioteko de Hamar. Ili plenigis 47 skatolojn, kaj laboris pri la afero dum entute 58 laborhoroj. Por la transporto al Mo i Rana pagos la Nacia Biblioteko. Egil O. Larsen kapablis havigi 40 fortikajn skatolojn por la pakado, kaj poste uzis multajn horojn por ordigi la nesendotajn periodaĵojn kiuj ne plenumas la kondiĉojn de la Nacia Biblioteko, do duoblaĵojn kaj lozajn numerojn. En la biblioteko en Hamar ankaŭ restas multaj libroj, proksimume 60 bretometroj.

La venonta estraro devos labori pri la aferoj kiujn la Nacia Biblioteko ne transprenos.

8. Eventualaĵoj

Nenio.

La interkonsiliĝo daŭris de 19:30 ĝis 20:51.

Raportis Ulf Lunde (dum punktoj 1–4) kaj Jardar Eggesbø Abrahamsen (dum punktoj 5–8).

La estraranoj aprobis la protokolon per retroŝto dum la tagoj post la interkonsiliĝo.

Ĉi tio estis la lasta interkonsiliĝo por la nuna estraro. Laŭ la plano la venonta interkonsiliĝo okazos la 27an de aŭgusto.